ISBN 978 92 9017 124 9

INTERNACIA KONGRESA UNIVERSITATO

67-a SESIO

Bonaero, Argentino
26 julio – 2 aŭgusto 2014

Jose Antonio Vergara (red.)

Universala Esperanto-Asocio

Lingva justeco: kiel taksi ĝin? La ekzemplo de Eŭropa Unio

Michele Gazzola

Naskiĝis en 1978. Esplordoktoriĝis en 2011 pri administrado de multlingva komunikado ĉe la Universitato de Ĝenevo, Svisio, sub la gvido de prof. François Grin. Nun esploristo pri lingva ekonomiko kaj taksado de lingvaj politikoj ĉe la Universitato Humboldt de Berlino, Germanio, sub la gvido de prof. Bengt-Arne Wickström. Respondecas pri esplor-projekto pri lingva politiko kaj lingva justeco en Eŭropo, financata de la Eŭropa Komisiono per la stipendio "Marie Curie" (Projekto LAPO). Li samtempe respondecas pri esplor-projekto financata de ESF pri indekso de lingva justeco en la mondo. Ano de la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS).
www.michelegazzola.com

Resumo

Ĝenerale homoj ne tre konscias pri malegaleco en la lingva kampo, kiu tamen abundas. Ni pensu ekz. pri minoritatlingvanoj, kiuj ne povas aŭ rajtas uzi sian lingvon en lernejo aŭ laborejo; enmigrintoj, kiuj i.a. pro lingvaj kialoj malfacile eniras la novan socion kaj tie trovas laboron; homoj, kiuj rajtus agi en internacia organizo kie tamen oni postulas denaskan konon de la angla aŭ franca; lernantoj, kiuj ŝatus studi per sia gepatra lingvo, sed devas lerni per lingvo kiun ili ne bone komprenas. Protektado de lingvo gravas ne nur kulture sed antaŭ ĉio praktike, politike kaj ekonomie: temas pri gardado de konkretaj interesoj de individuoj en la socia, politika kaj ekonomia vivo.

Ĉiuj konsentas, ke en iaj cirkonstancoj uzi ĉiujn lingvojn praktike ne eblas kaj ke limigo de la uzataj lingvoj foje necesas. Tamen, se en iuj kuntekstoj oni akceptas tian limigon, necesas enkonduki la principon, ke al privilegio de iu lingvo respondu specifaj kaj precizaj kompensoj (ekz. financaj transigoj) favore al la parolantoj de la lingvoj ekskluditaj. Tio estas ĝenerale la principo de lingva justeco kiel aparta formo de socia distribua justeco, kiun la elstara esperantisto prof. Jonathan Pool proponis en la 1990-aj jaroj. Novaj interpretoj de lingva justeco aldoniĝis en la 2000-aj jaroj. La debato iĝas ĉiam pli intensa sed samtempe pli konfuza. Kvankam evidentiĝas, ke ĝenerale lingva justeco kongruas kun la modernaj valoroj de libereco kaj egaleco, oni relative malmulte scias pri ĝi. Unu el la kialoj estas ĝuste, ke ekzistas pluraj, foje kontraŭdiraj difinoj de ĝi. Due, la koncepto de lingva justeco ankoraŭ ne estas mezurebla, kio verŝajne estas la plej grava problemo. Se ne eblas taksi lingvan politikon en difinita lando aŭ regiono laŭ la principo de lingva justeco, ne eblas plibonigi la lingvan politikon mem kaj sekve la vivkondiĉojn de la homoj.

La prelego celas precize aliri tiun ĉi problemon. Unue, oni prezentos kaj diskutos la rezultojn de la nuna sciencista debato pri lingva justeco. Due, oni esploros, kiujn karakterizojn devus havi aplikebla difino kiu taŭgas por empiria taksado de lingva politiko. Tio signifas, interalie, pripensi kelkajn indikilojn per kiuj eblas taksi aŭ mezuri lingvan justecon en iu lando aŭ regiono. Trie, oni proponos ekzemplon de taksado de lingva justeco en Eŭropo baze de statistika datumbazo liverita de Eurostat, la statistika instituto de EU

La prelego prezentos la unuajn rezultojn de esplora projekto financita de Esperantic Studies Foundation (ESF) pri indico de lingva justeco en la mondo kaj kelkajn rezultojn de esplora projekto pri lingva justeco en Eŭropo financita de la Eŭropa Komisiono ("LAPO").

Linguistic justice: how to evaluate it? The example of the European Union

Summary

In general people are not very aware of linguistic inequality, which is, however, rife. Think, for example, of the speakers of minority languages who are not able or not allowed to use their language in school or at work, immigrants who because of their language find it difficult to enter into the new society and find work, people who could work in an international organisation, where, however, native knowledge of English or French is required, people who would like to study in their native language but have to learn through a language that they do not understand so well. Consequently, protecting languages is important not only culturally but above all practically, politically and economically. It is a matter of protecting the concrete interests of individuals in social, political and economic life.

Everyone accepts that for practical reasons in some circumstances it is not possible to use all languages and that it is sometimes necessary to restrict the languages used. However, if in some cases a restriction on the use of languages is accepted then it is necessary to establish the principle that a privilege for one language over others must be matched by specific and precise compensation (financially, for example) in favour of the speakers of the excluded languages. This is the general principle of linguistic justice proposed in the 1990s by the outstanding Esperantist Prof. Jonathan Pool. New interpretations of linguistic justice were added in the following decade and the debate is becoming ever more intense, but at the same time ever more confusing.

Although it is becoming evident that, in general, linguistic justice fits with the modern values of freedom and equality, it is still relatively little-known. One of the reasons for this ignorance is precisely the various and occasionally contradictory definitions of it. Another reason is that the concept of linguistic justice is still not measurable. That is probably the most important problem today, because if one is unable to evaluate the language policies in a particular country or region according to the principle of linguistic justice then it is not possible to improve those language policies and thus people's living conditions.

The presentation aims to address precisely this problem. Firstly, the results of the current debate on linguistic justice in the academic world will be presented and discussed. Secondly, we will look at what features a suitable definition should have for empirically evaluating language policies. That means, among other things, considering some indicators that could be used to evaluate or measure linguistic justice in a country or region. Thirdly, one example will be proposed for evaluating linguistic justice in Europe, based on a statistical database provided by Eurostat, the EU statistical office.

The lecture will present the first results from a research project financed by the Esperantic Studies Foundation (ESF) on an index of linguistic justice in the world and some results from a research project on linguistic justice in Europe financed by the European Commission ("LAPO").

La justice linguistique : comment l'évaluer ? L'exemple de l'Union Européenne

Résumé

En général les gens n'ont pas vraiment conscience de l'inégalité dans le domaine linguistique, qui pourtant abonde. Pensons par exemple aux minorités linguistiques qui n'ont pas la possibilité ou le droit d'utiliser leur langue à l'école ou au travail ; aux immigrés qui pour des raisons linguistiques ont du mal à s'intégrer à une nouvelle société et à y trouver du travail; aux gens qui auraient le droit de s'impliquer dans une organisation internationale, mais où l'on exige une connaissance native de l'anglais ou du français ; aux personnes qui aimeraient étudier dans leur langue maternelle, mais doivent pourtant apprendre dans une langue qu'ils ne comprennent pas bien. Par conséquent, la protection des langues est importante, et pas seulement sur le plan culturel. Elle est importante en premier lieu sur les plans pratique, politique et économique : il s'agit de préserver les intérêts concrets des individus dans la vie sociale, politique et économique.

Tout le monde s'accorde à penser que, dans certaines circonstances, il n'est pas possible d'utiliser toutes les langues pour des raisons pratiques, et qu'il est parfois nécessaire de limiter le nombre de langues utilisées. Cependant, si dans certains contextes on accepte une limitation de l'utilisation des langues, il est nécessaire d'introduire le principe selon lequel, au privilège accordé à une langue par rapport aux autres, doivent correspondre des compensations spécifiques précises (comme des transferts financiers) en faveur des locuteurs des langues exclues. Cela constitue en gros le principe de justice linguistique comme forme particulière de la justice sociale distributive, qu'un éminent professeur espérantiste, Jonathan Pool, avait proposé dès les années 1990. De nouvelles interprétations de la justice linguistique sont apparues dans les années 2000. Le débat devient de plus en plus intense et en même temps de plus en plus confus.

Bien qu'il soit évident que, d'une manière générale, la justice linguistique est en adéquation avec les valeurs modernes de liberté et d'égalité, on connaît encore relativement peu de choses à son sujet. L'une des causes de cette méconnaissance réside justement dans le fait qu'il en existe plusieurs définitions, parfois contradictoires. Une autre raison, c'est que le concept de justice linguistique n'est pas encore mesurable. Cela constitue sans doute le problème le plus important aujourd'hui, car s'il est impossible d'évaluer les politiques linguistiques d'un pays ou d'une région donnés d'après le principe de justice linguistique, on ne peut améliorer les politiques linguistiques elles-mêmes, et par suite les conditions de vie des gens.

Le but de la présentation sera d'aborder ce problème de façon précise. On présentera et discutera d'abord les résultats du débat actuel sur la justice linguistique dans le monde académique. On explorera ensuite les caractéristiques que devrait posséder une définition applicable qui pourrait servir à une évaluation empirique des politiques linguistiques. Ce qui signifie, entre autres, réfléchir à quelques indicateurs au moyen desquels il serait possible d'évaluer ou de mesurer la justice linguistique dans un pays ou une région. Enfin on proposera un exemple d'évaluation de la justice linguistique en Europe, à partir d'une base de données statistiques fournie par Eurostat, l'institut d'études statistiques de l'Union Européenne.

La conférence présentera les premiers résultats d'un projet de recherche financé par l'Esperantic Studies Foundation (ESF) sur un indice de justice linguistique dans le monde, ainsi que quelques résultats d'un projet de recherche sur la justice linguistique en Europe financé par la Commission Européenne (projet « LAPO »).

¿Cómo evaluar la justicia lingüística? El caso de la Unión Europea

Resumen

En general, no existe mayor consciencia acerca de la desigualdad en el campo lingüístico, aunque ésta es frecuente. Piénsese por ejemplo en los miembros de minorías lingüísticas que no pueden usar su lengua en la escuela o el lugar de trabajo, careciendo de ese derecho; en los inmigrantes que, entre otras causas, se incorporan y encuentran trabajo con dificultades en una sociedad nueva, por su idioma; en las personas habilitadas para actuar en una organización internacional que sin embargo exige de ellos un dominio a nivel nativo de inglés o francés; en los estudiantes que desearían aprender mediante su lengua materna, pero que deben hacerlo en una que no entienden bien. En consecuencia, la protección de una lengua no es importante sólo en términos culturales. También importa sobre todo por razones prácticas, políticas y económicas: se trata de asegurar los intereses concretos de los individuos en la vida social, política y económica.

Existe amplio consenso respecto de que, en determinadas circunstancias, no es posible por razones prácticas usar todos los idiomas, siendo a veces necesario limitar las lenguas en uso. Sin embargo, si en algunos contextos se acepta una limitación al uso de lenguas, es necesario en consecuencia introducir el principio que ante el privilegio otorgado a algún idioma respecto de los demás, se deriven compensaciones específicas y precisas (por ejemplo, transferencias financieras) a favor de los hablantes de las lenguas excluídas. Eso es en términos generales el principio de justicia lingüística como forma particular de justicia social distributiva, propuesta en los años 1990s por el destacado profesor esperanto-hablante Jonathan Pool. En la década del 2000 se sumaron nuevas interpretaciones sobre la justicia lingüística. El debate se hace más y más intenso pero, al mismo tiempo, más y más confuso.

Aunque parece evidente que, en términos generales, la justicia lingüística es congruente con los valores modernos de igualdad y libertad, aún se sabe relativamente poco acerca de ella. Una de las razones de ese desconocimiento es que existen varias definiciones de la misma, incluso contradictorias. Una segunda razón es que el concepto de justicia lingüística aún no es medible. Este es probablemente el principal problema actual, ya que al no poderse evaluar las políticas lingüísticas en un determinado país o región de acuerdo al principio de justicia lingüística, no es posible mejorar esas políticas lingüísticas ni, en consecuencia, las condiciones de vida de la población.

El objetivo de la presentación consiste precisamente en abordar este problema. En primer lugar, se presentarán y discutirán los resultados del debate actual en el mundo académico sobre justicia lingüística. En segundo lugar se revisará qué características debería tener una definición aplicable, apropiada para la evaluación empírica de políticas lingüísticas. Esto implica, entre otros aspectos, diseñas algunos indicadores que permitan evaluar o medir la justicia lingüística en algún país o región. En tercer lugar, se propondrá un ejemplo de evaluación de justicia lingüística en Europa, a partir de una base de datos estadística proporcionada por Eurostat, el instituto de estadísticas de la Unión Europea.

En la disertación se expondrán los resultados preliminares de un proyecto financiado por la Esperantic Studies Foundation (ESF), sobre un índice de justicia lingüística en el mundo, y algunos resultados de un estudio de investigación de justicia lingüística en Europa, financiado por la Comisión Europea ("LAPO").

Lingva justeco: kiel taksi ĝin? La ekzemplo de Eŭropa Unio

Enkonduko

Oni devas konstati, ke ĉiu homo havas almenaŭ unu lingvon, kiu estas ĝenerale nomata gepatra, kaj ke ĝi estas donita kaj ne elektita, ĉar ĝin transdonas gepatroj aŭ / kaj la medio. Ĝi estas do atribuaĵo de ĉiu persono, kvazaŭ kiel haŭtkoloro aŭ sekso. Per lingvo homoj organizas sian penson, ĝin komunikas, interŝanĝas informojn, interagas kaj aktivas en la socio. Tial, la kapablo agadi per lingvo plene mastrata (kutime, ĝuste la gepatra lingvo) estas antaŭkondiĉo por aktive vivi en la socio kaj kapabli esti vera civitano, ekzemple kapabli studi, havi interhomajn kontaktojn, labori kaj sin defendi en tribunaloj.

Sekve, protektado kaj flegado de lingvoj gravas ne nur kulture. Ĝi gravas antaŭ ĉio praktike, politike kaj ekonomie: temas pri gardo de la konkretaj interesoj de la individuoj en la socia, politika kaj ekonomia vivo. Lasi, ke lingvo perdas funkciojn en la socio, signifas fakte malriĉigi – ne nur kulture, sed ankaŭ materie – tiujn, kiuj ĝin parolas kiel gepatran lingvon, ĉar tio malpligrandigas iliajn konkretajn ŝancojn aktivadi tiulingve en la diversaj kadroj de la socia, politika kaj ekonomia vivo. Lingva diskriminacio signifas suferi je la malavantaĝoj havi malegalecan pozicion koncerne aliron al kleriĝo, al justico kaj al la labormerkato ĉar onia gepatra lingvo ne estas la reganta lingvo en la socio. En tiuj medioj, ricevi iun lingvon kiel la unuan anstataŭ alian neeviteble influas oniajn kapablojn aktivi en la socio, kaj la prospero-ŝancojn entute. Lingva diskriminacio, sekve, povas transformiĝi en politikan kaj ekonomian diskriminacion.

Estas certe dezirinde lerni kromajn lingvojn (ĉu fremdajn aŭ la lingvon de la plimulto en multlingva ŝtato), kaj fakte la ŝtato per edukado povas instrui al siaj civitanoj, enmigrintoj aŭ minoritatoj plurajn lingvojn, kiuj aldoniĝas al la denaska. Tamen lernado de aldona lingvo, ĝenerale, ne devus iĝi kruda preteksto por simple nei la bezonon esti edukita ankaŭ per la propra denaska lingvo kaj por nei la eblon uzi ĝin en la socio. Ekzemple, instruado de la lingvo de la plimulto al homoj kiuj parolas minoritatan lingvon, ne devus esti preteksto por nei al ili instruadon en ilia denaska lingvo entute, asertante, ke la lingvo de la plejmulto "sufiĉas" por eviti diskriminacion.

Sekve, garantii la eblecon kiel eble plej grandan uzadi sian gepatran lingvon en komunikado kun la ŝtata aparato aŭ kun publikaj organizaĵoj, tio konsistigas nepran kondiĉon por ke individuo povu efektive ĝui siajn homajn, politikajn kaj civitanajn rajtojn. Pro tio, defendo de la lingvaj rajtoj estas alia flanko de la defendo de la homaj rajtoj. La konstato, ke ĉiuj homoj havas gepatran lingvon, havas du gravajn implicojn. Unue, la organizaĵoj ne povas esti vere demokrataj se ili ne baziĝas sur komunikado inkluda, alirebla al ĉiuj civitanoj per sia unua lingvo. Lingva demokratio estas, do, fundamenta ero de la demokratio mem (la koncepto de lingva demokratio estos pli detale klarigita ĉi-sube). Kompreneble, ĉiuj konsentas, ke en iaj cirkonstancoj uzi ĉiujn lingvojn ne eblas pro praktikaj kialoj, kaj limigo de la uzataj lingvoj foje necesas. Tamen (kaj tio ĉi estas la dua implico) se en iuj kuntekstoj oni akceptas limigon al uzado de lingvoj, necesas do enkonduki la principon, ke, al privilegio de iu lingvo kompare al la ceteraj, respondu specifaj kaj precizaj kompensoj (ekzemple, financaj transigoj) favore al la parolantoj de la ekskluditaj lingvoj. Tio ĉi estas ĝenerale la plej simpla difino de lingva justeco kiel aparta formo de socia distribua justeco, kiun Pool proponis jam en la 1990aj jaroj (Pool 1991). Ekzemple, la plejmulto povus pagi parton de la kostoj instrui sian lingvon al la minoritatanoj.

Kvankam ĝenerale evidentiĝas, ke la ideoj de lingvo-demokratio kaj lingva justeco kongruas kun la modernaj valoroj de libereco kaj egaleco, homoj ĝenerale ne tre konscias pri diskriminacio en la lingva kampo. La ekzemploj, tamen, abundas. Pensu pri minoritatlingvanoj, kiuj ne povas aŭ ne rajtas uzi sian lingvon en lernejo aŭ laborejo; enmigrintoj, al kiuj lingvaj kialoj malfaciligas eniri novan socion kaj trovi laboron; homoj, kiuj rajtus agi en internacia organizo kie tamen oni postulas denaskan scion de la angla aŭ franca; lernantoj, kiuj ŝatus studi per sia gepatra lingvo, sed tamen devas lerni per lingvo, kiun ili ne bone komprenas.

Unu el la kialoj de tiu miskono verŝajne estas, ke la konceptoj "lingvo-demokratio" kaj "lingva justeco" ofte estas ne klare difinitaj, aŭ ekzistas kontraŭdiraj difinoj. Ekzemple, la debato pri la koncepto de lingva justeco iĝis pli kaj pli intensa dum la lastaj jardekoj, sed samtempe pli kaj pli konfuza. Kompreneble, sen klara ideo pri tio, kion oni subtenu aŭ antaŭenpuŝu, estas malfacile agi tiucele. Dua kialo (ligita al la unua) estas, ke la koncepto de lingva justeco estas ĝenerale teoria, kaj malofte oni provas taksi ĝin per mezureblaj metodoj. Se oni ne povas taksi lingvan justecon en iu difinita lando aŭ regiono, oni ne povas plibonigi la lingvajn politikojn kaj sekve la vivkondiĉojn de la homoj. Ne ekzistas nuntempe raporto aŭ studo pri la stato de lingva justeco en pluraj landoj, kvankam antaŭ nelonge kelkaj paŝoj al tiu celo estis faritaj[1], simila al komparaj raportoj pri la rezultoj de landaj eduksistemoj (ekz. la *Programme for International Student Assessment* – Programo por internacia taksado de studentoj "PISA" – fare de la Organizaĵo por Ekonomia Kunlaborado kaj Evoluigo), aŭ pri la libereco de la gazetaro, pri diskriminacio kaj perforto kontraŭ virinoj, aŭ pri la stato de la poluado de medio. Tiuj raportoj foje estas utilaj, ĉar la gazetaro ofte mencias ilin, pro kio ili povas havi efikon. Ekzemple, indikiloj de la programo PISA povas esti utilaj por proponi taŭgajn kaj konkretajn politikojn por plibonigi la eduksistemojn.

La celo de tiu ĉi artikolo estas enkonduki la leganton al la temo de lingva demokratio kaj lingva justeco, kaj doni unu konkretan ekzemplon. Unue, oni rapide prezentos resumon de la plej gravaj argumentoj de la nuntempa debato pri lingva demokratio kaj lingva justeco en la sciencista mondo. Due, oni proponos ekzemplon de taksado de lingva justeco en Eŭropo, baze de statistika datumbazo liverita de Eurostat, la Eŭropunia instituto pri statistiko. Trie, oni rapide priskribos la ligojn inter la debato pri lingva justeco kaj la ideologio de la Esperanto-movado.

Lingva demokratio

Moderna demokratio baziĝas sur la kerna ideo, ke ĉiuj civitanoj en iu difinita ŝtato havas egalan balotrajton kaj similan efektivan rajton kandidati al elekteblaj postenoj. Sed demokratio ne estas simple balota sistemo[2]. Modernaj demokratioj baziĝas ankaŭ sur kelkaj kernaj ĝeneralaj principoj. Unue, egalaj rajtoj por ĉiuj homoj: t.e. leĝoj devas ne diskriminacii (principe kaj praktike), kaj la ŝancoj en la socio devus esti similaj por ĉiu persono. Due, libereco de komunikado: t.e. ne estu limigoj al la povo de individuoj opinii, kritiki, konvinki aliajn ktp, kaj la ŝancoj kontribui al publikaj debatoj kaj diskutoj devus esti similaj por ĉiu persono. Trie, efika partopreno en decidoj: t.e. politika potenco ne kuŝu nur ĉe kelkaj homoj, kaj ĉiu persono havu realan povon influi la decidan procezon (ne nur per balotoj, sed ekzemple per

[1] Internacia faka laborgrupo, kies kunordiganto estas la aŭtoro de tiu ĉi artikolo, estas nuntempe laboranta super la prilaboro de indikiloj por taksi lingvan justecon en pluraj landoj.

[2] Por diskuto pri la koncepto de demokratio, vidu Schumpeter (2006 [1942]) kaj Dahl (1962).

asocia vivo aŭ lobiado), almenaŭ kiam temas pri decidoj, kiuj tuŝas la tutan socion aŭ tiun personon aparte.

Certe ne ekzistas socio nuntempe, kie tiuj idealoj plene realiĝis en ĉiuj detaloj. Estas pli facile realigi la "negativajn liberojn" (t.e. neesto de diskriminacio, neesto de komunikaj limigoj) ol la "pozitivajn" (t.e. egalaj ŝancoj), sed demokratio konsistas el senfina evolua procezo, kiu ĉiam enhavos konfliktojn, malkonsentojn kaj malperfektaĵojn. En tiu kadro, la lingva aspekto de demokratio kiel pozitiva libereco iĝas aktuala kaj esplorinda, ĉar la kapablo agadi per lingvo en kiu oni sentas sin plej komforte (kutime, la denaska lingvo) estas antaŭkondiĉo por aktive vivi en la socio kaj por plibonigi siajn vivkondiĉojn.

Sekve, garantii la eblon uzadi sian "unuan lingvon" (kutime tiu estas la gepatra aŭ foje la ĉefa lingvo de edukado) en komunikado kun publikaj organizaĵoj estas nepra kondiĉo por ke individuo povu efektive ĝui siajn politikajn rajtojn kaj senbarile agadi en socio. Fakte, ŝtata aparato ne povas ne-komunikadi. Ŝtato povas esti neŭtrala koncerne religiojn, sed ĝi ne povas esti neŭtrala rilate al lingvoj (De Schutter 2007), ĉar ĝi nepre devas uzi almenaŭ unu lingvon por leĝaro, por funkciigi tribunalojn kaj amaskomunikilojn, aŭ doni edukadon en lernejoj. Pro tio, demokratio (kiel supre difinita) necese dependas ankaŭ de la lingva politiko de la ŝtato. Alivorte, lingva politiko necese influas la demokratecon de la ŝtato. Tio estas la kialo, kial lingva politiko aparte gravas: por esti plene demokrataj, publikaj organizaĵoj devus baziĝi sur komunikado inkluda, alirebla al ĉiuj civitanoj. Pro tio lingva demokratio estas fundamenta ero de demokratio kiel politika sistemo.

Lingva demokratio estas grava ne nur en la naciaj ŝtatoj, sed ankaŭ internacie, ekzemple en tiuj supranaciaj organizaĵoj kiel Eŭropa Unio (EU) kiuj estas oficiale multlingvaj. Kiel havi demokratan decidprocedon se la civitanoj ne povas facile kompreni la kandidatojn? Kiel atendi, ke la civitanoj venos al saĝaj decidoj, se la informoj kaj ideoj venas al ili nur per lingvoj kiujn ili ne tre bone regas? Starigo de iu komuna lingva kadro kiu ebligas inkluzivan komunikadon, estas esenca parto de la konstruado de la transnacia demokratio.

Lingva justeco[3]

Ekzistas pluraj fakaj tradicioj kiuj pritraktas la temon de lingva justeco. Pro limigiteco de spaco, ni priskribos la esencajn trajtojn de du tradicioj, nome la filozofia kaj la ekonomika. Ene de la filozofia kampo, oni povas trovi du kontraŭstarantajn tradiciojn. La unuan oni povus nomi *egalec-liberalisma* tradicio. Laŭ la aŭtoroj kiuj apartenas al tiu ĉi grupo (ekz. Van Parijs 2011, Pogge 2003, Laitin kaj Reich 2003), en modernaj socioj ĉiuj civitanoj devas havi la samajn ŝancojn studadi, aliri al la labormerkato, kaj moviĝi libere en la lando. Tamen, tio estas ebla nur se socio havas komunan lingvon. Alivorte, laŭ tiuj aŭtoroj egaleco de ŝancoj, socia kaj geografia movebleco, nacia unueco kaj socia koheremo (t.e. interligiteco inter la sociaj grupoj) eblas nur se oni havas unu komunan lingvon. Ĝenerale tiu lingvo estas la lingvo de la plejmulto. Parolantoj de lingvaj minoritatoj, sekve, estas "lingvaj handikapuloj" al kiuj oni devus instrui plej baldaŭ la regantan lingvon. Mondskale la handikapuloj estas la homoj kiuj ne parolas internaciajn lingvojn kiel ekzemple la anglan, la hispanan, la rusan aŭ la francan. Ĉar lingvo, laŭ la aŭtoroj kiuj apartenas al tiu ĉi grupo, estas esence ilo por komuniki, egalec-liberalistoj kutime rekomendas lingvan homogenecon, kaj naci- kaj internaci-nivele[4].

[3] Parto de tiu ĉi sekcio baziĝas sur antaŭfina versio de la "Raporto pri lingva justeco", skribita de D-ro Javier Alcalde por ESF (*Esperantic Studies Foundation*).

[4] Laŭ kelkaj aŭtoroj, tamen, tio ne kuntrenas la konkludon, ke ĉiuj aliaj lingvoj devas entute malaperi; iu formo de protektado povas esti akceptebla.

La duan filozofian tradicion oni povus nomi *multkultureca*, kvankam tiu ĉi etikedo ne nepre plaĉas al ĉiuj. Laŭ la aŭtoroj, kiuj apartenas al tiu tradicio (ekz. Kymlicka 2001, Patten 2009, Peled 2010, May 2011),[5] male, protekti lingvan diversecon kontribuas al justeco kaj libereco en la socio. Unue, malsameco de lingvoj kaj kulturoj ebligas al la individuoj *elekti* sian plej ŝatatan kulturan kuntekston (sen diverseco, elekto mem ne plu eblus, kaj ni ne plu estos liberaj elekti). Due, protekti lingvan diversecon kontribuas al justeco, ĉar ĉiuj lingvaj grupoj havas la saman homan kaj kulturan dignon kaj indecon. La homoj ne estas unuopaj individuoj. Ili naskiĝas kaj kreskas en grupoj aŭ komunumoj. Sekve, ankaŭ la rajtoj de la komunumoj (ekz. uzi lingvon) gravas, precize ĉar la individuoj konstruas sian individuan identecon ankaŭ baze de la trajtoj de la grupo en kiu ili vivas aŭ el kiu ili venas. Ĉar grupa identeco gravas por individuoj, grupaj rajtoj devas esti protektataj precize nome de individuaj rajtoj. La rezulto de tiu ĉi filozofia vidpunkto estas, ke la membroj de malsamaj lingvaj grupoj devus havi la eblon evolui en la modernaj socioj pere de *sia* lingvo (ekzemple minoritata). Tio signifas havi la eblon lerni, studi, sin defendi en tribunaloj pere de sia lingvo. Male, strebi al lingva homogeneco kaŭzas malegalecon kaj diskriminacion. Ĝenerale, multkultureca tradicio apogas protektadon kaj respekton de lingva diverseco, kaj do ili subtenas la uzon de pluraj lingvoj en la socio (ekzemple en edukado) kaj en la aparato de la ŝtato. Alivorte, ili subtenas multlingvecon.

La debato inter tiuj du tradicioj estas tre alloga kaj interesa, sed ankoraŭ ne produktis klarajn konkludojn. Plue, ĝi estas ofte tre teoria, kaj mankas praktikaj iloj por taksi kaj kompari lingvajn politikojn. Krom la du filozofiaj tradicioj, ekzistas almenaŭ plia interpreto de la koncepto lingva justeco, kiun oni povas nomi *ekonomika* (Pool 1991, Grin and Gazzola 2013, Gazzola 2014a). Laŭ tiu vidpunkto justeco estas ĉefe *kriterio* por taksi politikojn. Taksi justecon de lingvaj politikoj (aŭ "lingvan justecon") signifas identigi tiujn kiuj gajnas kaj tiujn kiuj perdas kiam lingva politiko *A* estas preferata al lingva politiko *B* (aŭ tiujn kiuj gajnas pli kaj tiujn kiuj malpli). Tio signifas taksi la *distribuon* de la avantaĝoj, de la malavantaĝoj kaj de la kostoj de alternativaj lingvaj politikoj inter homoj, kaj pli precize inter homoj kiuj apartenas al malsamaj lingvaj grupoj. Kostoj povas esti monaj (ekzemple, kostoj por lerni novan lingvon), sed ankaŭ psiĥaj (estigitaj de statusmalaltigo de la ceteraj lingvoj kaj de nememfido sin esprimi fremdlingve). Plue, taksi lingvan justecon signifas taksi ĉu la perdantoj ricevas kompensojn, kaj se jes, ĉu ili estas sufiĉaj (t.e. ĉu ili taŭgas por kompensi la malavantaĝojn).

La rezulto de la analizo, ĝenerale, ne estas etikaj rekomendoj. Tamen, taksado de lingva justeco el la ekonomika vidpunkto estas utila, ĉar ĝi liveras mezureblajn informojn pri la konsekvencoj de lingva politiko, kaj tio siavice povas kontribui al la filozofia debato pri ilia etika taŭgeco. La ĉefa avantaĝo de la ekonomika aliro al lingva justeco estas, ke ĝi estas pli facile empirie aplikebla. La venonta paragrafo donos ekzemplon de tiu taksado.

Lingva justeco en Eŭropo

Ni ne havas sufiĉe da spaco ĉi tie por detale priskribi la lingvan politikon de EU (vidu, inter aliaj, Phillipson 2004, Grin 2005). Sufiĉas memorigi, ke post la eniro de Kroatio en EU en la jaro 2014, EU havas 28 membroŝtatojn kaj 24 oficialajn kaj laborlingvojn. EU elspezas ĉirkaŭ € 1,1 miliardojn jare por tradukado kaj interpretado. Kelkaj aŭtoroj opinias, ke tiu kosto estas neeltenebla. Sed efektive, ĝi ne estas tiom alta se oni komparas ĝin kun aliaj

[5] Cetere, ne ĉiuj aŭtoroj, kiuj apartenas al tiu tradicio, estas filozofoj. Kelkaj estas socilingvistoj.

grandunuoj. € 1,1 miliardoj estas 0,0085% de la Malneta Enlanda Produkto (MEP) de EU, 1% de la buĝeto de la organoj de EU, kaj € 2,2 por eŭropa civitano (Gazzola kaj Grin 2013: 100). Oni certe ne povas serioze argumenti, ke tiuj kostoj estas neelteneblaj. Tamen, oni havas la rajton opinii, ke ili estas tro altaj aŭ tro malaltaj, sed tio estas subjektiva juĝo.

La argumento pri la neelteneblaj kostoj de multlingveco, sekve, ne estas tiom konvinka. Ekzistas tamen aliaj argumentoj. Kelkaj aŭtoroj asertas, ke la komunikado de EU estus pli *efika*, se nur unu lingvo estus uzata (Van Parijs 2011, Cogo kaj Jenkins 2010, De Swaan 2001). Plue, ili aldonas, EU iĝus ankaŭ pli koherema kaj *justa*, ĉar lingva diverseco kuntrenas malkompreniĝon kaj sekve mankon de solidareco inter la popoloj. Ĝenerale, tiuj aŭtoroj rekomendas la anglan kiel nuran oficialan lingvon de EU, ne nur kiel internan laborlingvon, sed ankaŭ kiel lingvon por ekstera komunikado. Aliaj aŭtoroj rekomendas lingvan politikon kiu oficialigas nur tri lingvojn, nome, la anglan, la francan kaj la germanan (Fidrmuc kaj Ginsburgh 2007). Estas do necese taksi kiuj estus la konsekvencoj de tiu ŝanĝo de la lingva politiko de EU. Alivorte dirite, kiuj estu hodiaŭ la efikoj de malplialtiĝo de la nombro de oficialaj lingvoj de EU? Ĉu la komunikado de EU iĝus vere pli *efika* kaj *justa* se oni uzus malpli da lingvoj?

Ni komencu analizi la efikecon, kaj ni koncentriĝu sur la ekstera komunikado de EU, t.e. la komunikado inter la organoj de EU kaj la ekstera mondo, ĉefe la loĝantaro. EU komunikas al la ekstera mondo per skribitaj dokumentoj kiel regularoj, retpaĝoj sed ankaŭ per "parolaj dokumentoj", kiel ekzemple unu horo de debato en la Eŭropa Parlamento, kiun loĝantoj povas komforte spekti hejme per komputilo konektita al la interreto.

La datumoj montras, ke uzi nur unu lingvon aŭ tri lingvojn estus multe malpli efike ol uzi ĉiujn oficialajn lingvojn. Tabelo 1 montras la procenton de la plenkreskula loĝantaro en 24 Eŭropaj landoj[6], kiuj estus ekskluditaj de komunikado kun la organoj de EU se la nombro de oficialaj lingvoj iĝus unu aŭ tri, pro la fakto ke ili ne komprenas tiujn lingvojn. Ni uzos la literon *E* por difini tiun procenton, kaj ni uzas ĝin kiel indikilon pri efikeco. Ju pli malalta *E*, des pli alta la efikeco de iu lingvo politiko. Eble ankoraŭ ne estas klara konsento inter fakuloj pri kion lingva justeco precize signifas, sed ŝajnas evidente al ĉiuj ke lingva ekskludado estas maljustaĵo, kiu povus havi negativajn konsekvencojn por la eŭropa demokratio.

Tabelo 1 : Procento de la ekskludataj loĝantoj en EU laŭ lingva politiko (EU-24). Rezultoj en procento.

Lingva politiko	***E***
Multlingveco (24 lingvoj)	0
Tri lingvoj	28
Nur angla	49

Fonto: Gazzola (2014b)

Tabelo 1 montras, ke multlingveco estas klare la plej efika lingva politiko inter la tri prezentitaj ebloj. Ekzemple, se la germana, la angla kaj la franca estus la nuraj oficialaj lingvoj de EU, 28% de la loĝantaro en la 24 studitaj landoj ne havus iun ajn aliron al la dokumentoj de EU ĉar ili komprenas neniun el tiuj tri lingvoj. Tio ne signifas, kompreneble, ke 72% de la loĝantaro flue parolas almenaŭ unu el la tri lingvoj, sed simple ili havas *almenaŭ* iom da

[6] Temas pri la 28 membroŝtatoj de EU, minus Irlando, Nederlando, Malto kaj Luksemburgo. Datumoj por tiuj membroŝtatoj malbonŝance ne haveblas. La datumoj, kiujn ni uzas en tiu ĉi artikolo estis publikigitaj de Eurostat en 2011, kaj ili koncernas loĝantojn en EU, kiuj havas inter 25 kaj 64 jarojn. Nia samplo enhavas pli ol 190 000 statistikajn observojn.

kono de ĝi. Fakte, Eurostat prilaboris kvar nivelojn de kono de fremdaj lingvoj, pere de kiuj la individuoj de la samplo povis memtaksi siajn lingvajn konojn de fremdaj lingvoj.

La niveloj estas:

- *Baza* (t.e. "mi povas kompreni nur kelkajn vortojn kaj frazojn");
- *Akceptebla* (t.e. "mi povas kompreni kaj uzi la plej kutimajn ĉiutagajn esprimojn. Mi uzas la lingvon en rilato al konataj aferoj kaj situacioj");
- *Bona* (t.e. "mi povas kompreni la esencon de klara lingvaĵo kaj skribi simplan tekston. Mi povas priskribi spertojn kaj eventojn");
- *Tre bona* (t.e. "mi komprenas vastan aron de malfacilaj tekstoj kaj uzas flekseble la lingvon. Mi regas la lingvon preskaŭ entute")

Ĝenerale, oni povas dubi, ke "baza", "akceptebla" aŭ eĉ "bona" kono de fremda lingvo sufiĉas por kompreni sen tro da streĉo la enhavon de Eŭropunia komunikado. Fakte, la procento de la (potenciale) ekskluditaj loĝantoj grande kreskas, se oni aplikas pli striktan difinon de lingva kono, t.e. esti denaskulo aŭ koni la lingvon "tre bone" (laŭ la difino ĉi supre). Ekzemple, Tabelo 1 montras, ke uzi nur la anglan ekskludus entute 49% de la eŭropa loĝantaro, sed tiu procento atingus 81% se oni difinas homon kiel ekskluditan se li aŭ ŝi ne estas denaskulo de la angla aŭ se li aŭ ŝi ne regas ĝin "tre bone". Uzi nur la anglan, la francan kaj la germanan ekskludus entute 28% de la loĝantaro, sed tiu procento grimpus al 55% se ni aplikas nian strikan difinon de lingva kono. Tiuj estas impresaj procentoj.

Tamen, en la venontaj paragrafoj de tiu ĉi artikolo ni uzos la simplan indikilon E por kalkuli la absolutan procenton de ekskludado, tio estas, la procento de la loĝantaro kiu ne konas (eĉ ne sur "baza" nivelo) *iun ajn* el la oficialaj lingvoj difinitaj per lingvopolitiko, ekzemple 24, 3 aŭ 1.[7] La avantaĝo de tiu ĉi strategio estas, ke ĝi permesas al ni eviti la kritikon de tiuj, kiuj malfidas memtaksadon de la lingvaj konoj de la loĝantoj. Oni devas tamen atentigi la leganton, ke la indikilo E donas nur partan bildon de la tuto, kaj ke la realaj procentoj de ekskludado estas verŝajne multe pli altaj ol tiuj, kiujn ni prezentos en la venontaj tabeloj.

Tabelo 1 montras nur averaĝajn rezultojn por EU, sed grandaj diferencoj ekzistas inter la landoj, kiel montras Tabelo 2. En kelkaj landoj pli ol tri kvaronoj de la loĝantaro estus entute ekskludita de la aliro al la oficialaj dokumentoj de EU aŭ al la debatoj en la Eŭropunia parlamento (kiuj hodiaŭ estas facile alireblaj en la reto), se la angla estus la sola oficiala lingvo de EU. Unulingva aŭ trilingva lingvopolitiko, sekve, estus samtempe multe malpli efika ol la nuna multlingva lingvopolitiko, kaj ĝi estigus gravan malegalecon inter la eŭropaj membroŝtatoj.

Tabelo 2 : Procento de la ekskludataj loĝantoj en EU laŭ lingva politiko kaj laŭ la lando (EU-24). Rezultoj en procento.

Lando	Nur angla	Tri lingvoj
Aŭstrio	32	0
Belgio	42	14
Bulgario	79	64
Britio	1	0
Cipro	17	16
Ĉeĥio	67	47

[7] Vidu Gazzola (2014b) por pli ampleksa analizo.

Danio	15	13
Estonio	54	46
Finlando	20	19
Francio	55	0
Germanio	43	1
Grekio	54	52
Hispanio	67	58
Hungario	85	77
Italio	54	40
Kroatio	56	38
Latvio	59	48
Litovio	62	45
Pollando	75	62
Portugalio	64	54
Romanio	81	74
Slovenio	40	23
Slovakio	70	49
Svedio	9	9
TOTALO	**49**	**28**

Fonto: Gazzola (2014b)

Klare, la procentoj montritaj en Tabelo 1 kaj Tabelo 2 prezentas la situacion en iu difinita historia momento, kaj ili povus malpligrandiĝi en la estonteco, ĉefe danke al instruado de fremdaj lingvoj en lernejoj. Tamen, instruado bezonas multe da tempo por esti vere efika, kaj esti devigata lerni fremdan lingvon ne estas sufiĉa kondiĉo por efektive lerni ĝin tre bone. Estas vere, ke la procento de la homoj kiuj havas almenaŭ bazan konon de la angla en Eŭropo estas pli alta ĉe la junaj generacioj. Sed la procento de la loĝantoj kiuj havas denaskan aŭ tre bonan konon de la angla estas averaĝe konstanta trans generacioj (Gazzola 2014b). Alivorte, la junuloj konas la anglan pli nombre ol la maljunuloj, sed averaĝe ne multe pli bone el la kvalita vidpunkto. La procento de la eŭropa loĝantaro kiu ne parolas denaske la anglan aŭ ne regas tiun lingvon sur tre bona nivelo estas ĉirkaŭ 80% en ĉiuj aĝgrupoj (Gazzola 2014b). Sekve, la bezono de tradukado kaj interpretado ne draste ŝanĝiĝos en la proksima estonteco.

Ni aliru nun la temon de lingva politiko kaj justeco en Eŭropo. Ĉu estas vere, kiel asertas kelkaj aŭtoroj, ke EU iĝus pli koherema kaj justa se ĝiaj organoj uzus nur unu (aŭ tri) oficiala(j) n lingvo(j)n? Pluraj homoj opinias, ke lingva diverseco kuntrenas malkompreniĝon inter la popoloj kaj sekve mankon de solidareco inter la homoj. La datumoj malkaŝas al ni, ke la malo veras. Por studi tion, oni analizas la *distribuon* de la indikilo *E* laŭ la nivelo de enspezaro kaj laŭ la nivelo de edukado atingita de la loĝantoj.

Tabelo 3 montras la distribuon de la procento de ekskludado *E* laŭ la kategorio de enspezaro de la eŭropaj loĝantoj. Oni disigas la loĝantaron laŭ kvin kategorioj aŭ klasoj. Ĉiu kategorio reprezentas 20% de la loĝantaro (en statistiko, oni uzas la vorton "kvintilo"). La unua klaso entenas la 20% de la loĝantaro kiu havas la relative pli malaltan enspezaron (por simpligi, temas pri la plej malriĉaj loĝantoj). La klaso numero 5 konsistas el la 20% de la loĝantaro kiu havas la relative plej altan enspezaron (por simpligi, temas pri la plej riĉaj loĝantoj).

Tabelo 3 : Procento de la ekskludataj loĝantoj en EU laŭ lingva politiko kaj laŭ la enspezara klaso (EU-23). Rezultoj en procento.

	Kategorio				
	1	2	3	4	5
Lingva politiko					
24 lingvoj	1	0	0	0	0
Tri lingvoj	38	29	25	21	13
Nur angla	60	56	52	45	29

Fonto: Gazzola (2014b)

La rezultoj de la tabelo montras, ke se EU uzus nur unu oficialan lingvon aŭ nur tri oficialajn lingvojn, la procento de la loĝantoj, kiuj sekve estus ekskluditaj, estus pli alta en la klaso de la malriĉuloj ol en la klaso de la riĉuloj. Ekzemple, la procento de la eŭropa loĝantaro, kiu tute ne regas la anglan estas, respektive, 29% inter la riĉuloj kaj 60% inter la malriĉuloj. Tio signifas, ke se la angla estus la nura oficiala lingvo de EU, tiuj kiuj havos pli da problemoj aliri komunikadon kun EU, estus ĝuste la malpli riĉaj loĝantoj.

Similan analizon prezentas Tabelo 4, kie oni montras la procenton de la loĝantaro, laŭ la nivelo de eduko atingita, kiu ne havus aliron al la dokumentoj de EU se ĝi ŝanĝus sian lingvan politikon.

Tabelo 4 : Procento de la ekskludataj loĝantoj en EU laŭ lingva politiko kaj laŭ nivelo de eduko (EU-24). Rezultoj en procento.

Nivelo de edukado	Baza	Malsupera meza	Supera meza	Post-meza	Tria grada
Lingva politiko					
24 lingvoj	1	1	0	0	0
Tri lingvoj	71	42	26	15	7
Nur angla	93	72	49	33	19

Fonto: Gazzola (2014b)

La nuna lingva politiko de EU permesas al ĉiuj eŭropaj loĝantoj havi aliron al la oficialaj dokumentoj de EU, kaj ĉiuj povas principe legi la dokumentojn de EU en 24 lingvoj. Tio okazas ĉar tiuj 24 lingvoj estas ĝenerale la gepatraj lingvoj de la eŭropanoj, aŭ lingvoj pere de kiuj, entute aŭ parte, oni ricevas edukadon (tio estas la kazo de minoritatoj; ekzemple multaj eŭskoj lernas ankaŭ per la hispana lingvo). Tamen, se EU uzus nur unu oficialan lingvon aŭ nur tri oficialajn lingvojn, grava malegaleco aperus inter la eŭropaj loĝantoj, kiu rilatas al ilia nivelo de eduko. Havi aliron al la dokumentoj publikigitaj de EU estus averaĝe pli malfacile por la loĝantoj kiuj atingis malaltan aŭ mezan nivelon de eduko ol por tiuj, kiuj havas pli altan nivelon de eduko. Ekzemple, la procento de la eŭropa loĝantaro, kiu tute ne regas la anglan, la francan aŭ la germanan estas, respektive, 7% de la loĝantoj kiuj havas superan nivelon de edukado, sed 26% de tiuj kiuj atingis superan meznivelan edukadon (tio estas, ĝenerale, la nivelo kiun oni atingas je la fino de la deviga lernejo, pli-malpli kiam oni estas 18-jaraĝa). Sekve, se la angla, la franca kaj la germana estus la nuraj oficialaj lingvoj de EU, tiuj kiuj havos pli da problemoj aliri komunikadon kun EU, estus la malpli edukitaj loĝantoj. Memoru, ke la rezultoj en la tabeloj montras la procenton de la loĝantoj kiu estus ekskluditaj el komunikado kun EU ĉar ili konas neniun oficialan lingvon *senkonsidere* la nivelon de

ilia kono. Se oni difinas kiel "ne ekskluditan loĝanton" homon kiu estas denaskulo de unu oficiala lingvo, aŭ homon kiu parolas tre bone almenaŭ unu oficialan lingvon, la procentoj de ekskludado estos multe pli altaj.

La ĝenerala konkludo nature sekvas: hodiaŭ en EU multlingveca lingva politiko estas samtempe klare multe pli efika kaj pli egaleca ol unu- aŭ tri-lingva politiko. Multlingveco, sekve, havas apartan valoron por la plej malriĉaj kaj la malpli edukitaj loĝantoj. Iel oni povus konkludi, ke multlingveco kontribuas al socia justeco.

Lastaj rimarkoj kaj ligo al la agado de UEA

Oni povas konstati, ke la ideoj de la egalec-liberalisma filozofia tradicio kaj de la multkultureca tradicio reeĥiĝas kaj reaperas en la debato ene de la Esperanto-movado, kaj ĉefe ene de Universala Esperanto-Asocio (UEA). Oni rimarkis, ke

> en la komenca epoko de la lingvo, Esperanto aperis unuavice kiel ilo por transiri lingvajn barojn, kiuj aspektis nesupereblaj. Apud tiu celo Zamenhof strebis al la unuigo de la homaro, kaj li ne vidis ion aparte negativan en tio, se en fora estonteco naciaj lingvoj malaperus (Pietiläinen 2010: 781).

Ĝis la epoko de Lapenna, la esperantistoj rigardis plurlingvecon (aŭ plurlingvismon aŭ multlingvecon, ni uzas tiujn vortoj kiel sinonimojn) ĉefe kiel la mondan lingvan problemon, kiu kuntrenas altajn kostojn de tradukado kaj interpretado kaj lingvajn barojn (Lapenna 1974).

La ideologia ŝanĝiĝo komenciĝis en la 1970 jaroj, kiam pli kaj pli evidentiĝis, ke en la okcidenta mondo estas kreskanta la rolo de la angla lingvo kiel internacia komunikilo. La movado laŭgrade pli kaj pli interesiĝis pri la mondaj lingvaj problemoj (pluralo) kaj pri la protektado de egaleco inter lingvoj, ĉefe minoritataj. Alivorte,

> ne plu temis pri forigo de 'la lingva problemo' laŭ la stilo de Ivo Lapenna, sed pri forigo de lingva malegaleco kaj kontraŭstaro al la superrego de la grandaj naciaj lingvoj. Necesus reformi la tutan sistemon de lingva komunikado, doni pli da atento al minoritataj lingvoj kaj al diskriminacio sur ĉiu nivelo. Esperanto povintus venki nur en kondiĉoj, en kiuj la tuta lingva situacio de la mondo estus reformita (Pietiläinen 2010: 788).

La kristaliĝo de tiu idea fluo okazis dum la 1990-aj jaroj,

> en la Manifesto de Prago, kiu klare difinas la lokon de la Esperanta movado ĉe la flanko de defendantoj de plurlingvismo kaj minoritataj lingvoj. Ne plu temis pri la altegaj kostoj de plurlingveco aŭ pri malbonaj rezultoj de lingvo-instruado (kiam temas pri naciaj lingvoj), sed pri la bezono konservi plurlingvecon kaj veran egalecon inter ĉiuj lingvoj (Pietiläinen 2010: 788).

Dum tiuj jaroj esperantistoj ekkomencas uzi la vorton "lingva demokratio" (Fettes kaj Bolduc 1998). Evidentiĝas, ke parto de la esperantistaro laŭgrade distanciĝis de la ideologio kiu apartenas al la egalec-liberalisma tradicio, kaj aliĝis al argumentoj, kiuj apartenas al la multkultureca tradicio. Tio ne signifas, tamen, ke la movado entute kaj kohere moviĝis al nova ideologio. Pluraj esperantistoj daŭre opinias, ke la homaro bezonas unu komunan lingvon, kaj ke plurlingveco estas problemo (Chiti-Batelli 2003). La debato estas aparte intensa en Eŭropo, kie kelkaj vidas Esperanton kiel taŭgan nuran oficialan lingvon de eble estonta Eŭropa federacio (Pagano 1997, Chiti-Batelli 2007). Apogi multlingvecon, laŭ tiuj aŭtoroj, signifas implicite favori la disvastigon kaj la hegemonion de la angla lingvo. Multlingveco, laŭ tiuj aŭtoroj, estas fiaskanta ĉar eŭropanoj ĉiukaze volas kaj bezonas havi unu komunan